

Heinrich Heine,

## En nord' unu pino

*tradukita de Ludwig Lazarus Zamenhof*

En nord' unu pino en solo  
Dormetas sur nuda altaĵo;  
Glacia kaj neĝa tavolo  
Ĝin kovras per tomba tolaĵo.

Ĝi sonĝas, ke palmo gracia,  
En unu dezert' orienta,  
Eterne pri lando alia  
Malgaje sopiras silenta.

*Traduko de la Germana poemo "Ein Fichtenbaum steht einsam" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de LUDWIG LAZARUS ZAMENHOF (Ludoviko Lazaro Zamenhofo, \*1859-12-15 – †1917-04-14).*

*Arg-1023-2073 (2014-05-23 14:27:37)*

*Tiu ĉi Zamenhofa poem-traduko troviĝas en <http://edu.i-lo.tarnow.pl/esp/lern/librejo/0012/0008.php>.*